

Heinrich Heine,  
Libro de la kantoj, Songobildoj IX

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Dormante milde songis mi,  
Ĉagren' forlasis min,  
Al mi aperis song-vizi',  
Plej bela la knabin'.

Marmore pala estis ŝi  
Kaj plena de sekret',  
En la okulo naĝis ĝi  
Samkiel perl-bluet'.

Kaj tiu bildo de marmor'  
Mallaŭte movis sin,  
Premetas sin al mia kor',  
Karesis ame min.

Batadas laŭte mia kor',  
Varmege brulas ĝi;  
Al ŝi sentiĝas ne amor',  
Ŝi estas el glaci'.

Ŝi diris: Kvankam estas mi  
Malvarma kiel mort',  
Konata tamen estas ĝi  
Al mi, de l' amo fort'.

Ne ruĝas mia buŝ' kaj vang',  
Sed min ne timu vi;  
Tra mia kor' ne fluas sang',  
Sed vin tre amas mi.

Kaj pli sovaĝe premis ŝi  
Min preskaŭ ĝis dolor';  
Forlasis min je l' kokvir-kri'  
La ino de marmor'.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Traumbilder IX" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-697-1404 (2012-12-05 22:35:03)*